

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
PRIEURE SAINT-MARTIN

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns	76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre	59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie	49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon	59000 LILLE
Peranta IKUE: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d'Orves	54490 PIENNES

C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n^o: 8 F. Abono: 30 F. Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

==== N^o 174 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== SEPTEMBRO 1992 ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent. nepre antaŭ
la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

LE MOT DU PRESIDENT

On n' arrête pas l' homme qui chante, dit un proverbe russe. Non, on n' arrête pas l' homme qui chante, car celui qui exprime ainsi sa joie ou sa peine trouve en lui-même l' élan nécessaire pour tendre sa volonté; il est alors impossible de barrer la route à un tel homme.

On n' arrête pas non plus l' homme qui chante, car son chant produit effet sur ceux qui l' écoutent et, pour peu que la mélodie et les paroles trouvent un écho favorable chez les auditeurs, ceux-ci, subjugués et conquis, prêtent une oreille attentive au chant qui élève leur coeur et le rend réceptif au message d' espoir qu' il véhicule.

En notre double qualité de chrétiens et d' espérantistes, nous sommes nous aussi des hommes qui chantent, car nous avons également un double message à transmettre, celui de notre Foi au Dieu vivant et celui de notre certitude en la valeur et l' utilité de la Langue Internationale.

Comme l' homme qui chante, rien ne doit arrêter notre enthousiasme et notre confiance dans la justesse et la grandeur de notre idéal.

Puissions-nous chanter avec assez de conviction et de force pour qu' il se réalise au plus tôt malgré l' indifférence et les préjugés du public au sujet de la valeur de notre action.

A. B.

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Oni ne haltigas kantanton, diras rusa proverbo. Ne, oni ne haltigas kantanton, ĉar kiu tiel esprimas sian ĝojon aŭ sian ĉagrenon trovas en si la necesan elanon por streĉi sian volon; tiam estas neeble bari la vojon al tia homo.

..//...

PRI FERMITA ĜARDENO EN PICPUS

En majo 1792 la monaĥinoj de S-ta Aŭgusteno forlasas sian domon apud Picpus-vilaĝo. En oktobro samjara la destinoŝanĝita stablo estas luigita. (La tiama bieno etendiĝis oriente-okcidenten, tie kuntuŝiĝante kun strato de Picpus, flanke de kiu staris la monaĥinejaj konstruaĵoj, poste loĝataj de gastiganto). En marto 1794 la nova luprenanto vicluigas la lokon, por ke estu tie aranĝata resanigejo pro la saniga kvalito de la aero. Tre monodonaj montriĝas tiaj stabloj, ĉar la homoj pli volonte forferas sian havaĵon ol sian vivon...

La bela ĉirkaŭbarita ĝardeno longas 1200 futojn; sablokovritaj aleoj enkadrigas legombedojn. Inter la gastoj oni menciuj grafon de Buffon, la filon de la fama natursciencisto.

La 26-an de prerialo jen venas du funkciuloj, kiuj esploras la francstilan parkon, fruktoarbojn, vitejon, terpomajn plantaĵojn kaj la ĉarman groton de la monaĥinoj aranĝitan kiel kamparstilan kapelon. La morgaŭan tagon je matenruĝo, laborskipo estas enlasita en la bienon kaj jam eklaboras fine de la ĝardeno: temas pri 34 terfosistoj, kiuj, trarompinte la nordan muron, sarkas legomojn, terpomojn kaj vinbertrunkojn, branĉofaskigas fruktoarbojn kaj ekfosas larĝan kavaĵon murpiede en la sudokcidenta angulo. La plendojn de la loĝantoj la laborentreprenisto preteratentas, ĉar estas al li, ordonite fosi tombegon al la ekzekutitoj destinata. Ĉar la gilotino ĵus translokiĝis de placo de Bastilo al placo de la Renversita Trono, urĝas la laboro: 38 kapoj kaj korpoj de parlamentanoj el Toulouse amasiĝas tute proksime en la ruĝa ŝarĝoĉarego kaj estas enterigendaj. La ĉirkaŭbaritan ĝardenon en Picpus oni elektis, ĉar oni povos tien kaŝe konduki la enterigotojn. La unua tombofoso estas 20 futojn (6, 50 metrojn) profunda; aliajn du oni aldonos. Tabulpalisaron oni starigas por apartigi disde la restanta bieno la necesajn 1500 kvadratajn metrojn.

En la breĉo de la norda muro oni konstruas porĉaran pordon. Ĉiutage envenas kadavroj po 30, 40, 50. La malbona grundostato kaj pezego de la veturiloj tiel malfaciligas la laboron, ke eĉ dum la plej longaj somertagoj la ĉaroplano atingas la tombejon nur malfrunokte. Kaj tie plenumiĝas la laboraĉo. El la ĉaregoj oni eltiras la stumpigitajn korpojn. Skribisto notas la liston de la forprenitaj vestaĵoj, hontinda rekompenco, kiun la fiuloj dividas inter si (poste ili estos sendataj al la hospitala administrado kaj post lavado disdonataj al mizeruloj). Por malpliigi la naŭzan haladzon oni ĵetas timianon, salvion kaj juniperon post la nudaj korpoj, en la fundon de la vasta kavaĵo.

La tiea loĝantaro kolektive direktas plendon pro tio, ke endanĝerigata estas la vilaĝo pro la ĉie ŝvebanta haladzo. Kvin estroj de edukejoj, kie kalkuliĝas pli ol 300 respublikanaj lernantoj, kun estroj de kelkaj resanigejoj, vinber- kaj terkulturistoj, furiozas tial, ke tiuj forpasintaj aristokratoj, dumvivaj malamikoj de la popolo kaj respubliko, eĉ postmorte mortigas la nunajn civitanojn; ili veas kontraŭ tiuj konspirintoj, kies putriĝantaj korpoj igas la lokon neloĝebla. Tamen daŭre malfermiĝas la tombofoso, kiun oni neglektas surŝuti per kalko. Post la ĉiutagaj entombigoj oni nur kovras la kadavrojn per kelkaj ŝovelilplenoj da tero. Ni miras ĉe la penso, ke tia favorpeta letero estis subskribita de 60-, 70-, eĉ 80-jaruloj...

Ĉiuj luprenantoj rezignas pri la loko. La aŭtoritatoj sendas arkitekton, kiu konkludas, ke prave plendis la najbararo. Por malpliigi la kontaĝon oni kovras la tombofoson per planko, tra kiun oni aranĝos klapopordojn por faciligi la laboron. Tiel okazis fine de messidoro, dum varmega somero.

Jen 45 kadavroj la 4-an de termidoro, 55 la 5-an (inter ili Alexandre de Beauharnais kaj princo de Saksujo); 36 la 6-an. Jam ne plu temas pri politikaĵoj, ĉar inter la ekzekutitoj vidiĝas 17-jarulo tial, ke li plendis pro malfreŝaj haringo antaŭ du tagoj surtablitaj en St-Lazare malliberejo; 84-jara viro, 21-jara paralizita virino, la kripla abatino de Montmartre, Louise de Montmorency. La 7-an, 37 kadavroj, inkluzive de la poeto André Chénier; la 8-an, 52 viktimoj. La 9-an, sur strato S-ta Antono (pardonu: la vorton "sankta" oni delonge forigis) la naŭzita popolamaso haltigas la ŝarĝoĉaregon kaj provas ĉesigi la amasbuĉadon: vane tamen. Ĝin baldaŭ ĉesigos la falo de Robespierre. En la tiutaga ĉarego interalie staras profesoro pri astronomio, eksservisto de la onklino de "Capet", maljuna geedza paro - la surdblanda edzo de pli ol tri jaroj estas tute kadukiĝinta.

En Picpus la alta palisaro kaŝas la mortokampon. Unu el la tombofosoj plenas ĝis triono de la alteco; la dua entenas du aŭ tri korpotaĵojn.

En februaro 1795 estos permesite al la arkitekto fine ŝtopi la tombofosojn kaj malkonstrui la palisaron. En la unua kavaĵo 6,50 metrojn profunda la korpoj de la ekzekutitoj prezentis kubon 2,50 metrojn alta, 8 metrojn longakaj 5 metrojn larĝam.

Henriette de la Chevalerie kun 5 kunulinoj formas la kernon de la kongregacio de la Sankta Koro kaj konstanta adorado (la fondintino mortos en 1835). Silento, fastado, senvianda dieto, lignotabulo kiel lito. En 1805 la monaĥinoj endomiĝas en Picpus-bienon kaj promesas, ke ĉiujare ili tie solenos la okazintaĵojn per memorfestaj diservoj. Krom dum kelkaj tagoj en la tempo de la pariza Komunumo (1871), neniam ĉesis la enkapela konstanta adorado. Neniu monaĥinejo en la eŝafodepoko fondita de nobelinoj por repagi la revoluciajn krimojn pli bone povus taŭgi por prizorgi la nekropolon de la teroro. La listo de la mortintoj sumiĝas je 1298 nomoj, el kiuj 197 virinaj. Ĝi konsistas el 579 popolviroj, 178 glavportintoj, 136 jurfakuloj, 108 ekleziuloj, 108 eksnobeloj, 123 popolvirinoj, 51 eksnobelinoj, 23 monaĥinoj.

Nuntage ĉe la parka enirejo tre malhelas la kapela, kie unuavide distingebblas nur surgenuaj blankaj formoj, kvazaŭ preĝantaj fantomoj surslabe kaŭraj. Sur la transepta muro legeblas la longa listo de la enterigitoj. Antaŭ la tabernaklo adorpregas du monaĥinoj, kapvestitaj per blanka muslina vualo. Sur la lana robo ruĝas vasta mantelo, kies trenajo kvazaŭ balaas la sanktejan grundon. Ĉiutage estas celebrata meso honore al la revoluciaj viktimoj. Ĉiuprintempe okazas solena memorfesta diservo por ĉiuj, kiuj pereis tie proksime. Post la solenaĵo, laŭlonge de la ĝardenaj aleoj, procesio sin direktas al la tombejo, kie oni preĝas por la viktimoj kaj ties ekzekutistoj.

Simone BONIOL

LA VIVO

La vivo estas bonŝanco,
kaptu ĝin.
La vivo estas beleco,
admiru ĝin.
La vivo estas beateco,
gustumu ĝin.
La vivo estas revo,
efektivigu ĝin.
La vivo estas defio,
kontraŭstaru ĝin.
La vivo estas devo,
plenumu ĝin.
La vivo estas ludo,
ludu ĝin.
La vivo estas valora,
prizorgu ĝin.
La vivo estas riĉeco,
konservu ĝin.

La vivo estas amo,
ĝuu ĝin.
La vivo estas mistero,
malkovru ĝin.
La vivo estas promeso,
plenumu ĝin.
La vivo estas malĝojo,
supervenku ĝin.
La vivo estas himno,
kantu ĝin.
La vivo estas batalo,
akceptu ĝin.
La vivo estas tragedio,
ĉirkaŭbraku ĝin.
La vivo estas aventuro,
defiu ĝin.
La vivo estas feliĉo,
meritu ĝin.

La vivo estas la vivo,
defendu ĝin.

Patrino TEREZA

LA KATEDRALO S-ta GACIANO EN TOURS

La katedralo de Tours, atestanto de brila pasinto kaj longa historio, situas sur la ruinoj de la galli-romiana civito Caesarodunum en la koro de fortikigita urbo, kiu iĝis la centro de unu el la plej famaj pilgrimoj en Okcidento kaj restas unu el la ĉefurboj de la Loire-valo. Ĝi estas plej grava loko por la ŝatanto de historio kaj ankaŭ por la diserĉanto.

Brila pasinto: la katedralo brilas en regiono famigita de S-ta Gaciano, unua episkopo de Tours, S-ta Lidorio, S-ta Marteno, la apostolo de Turanĝio kaj Gallio, S-ta Gregoro de Tours.

